# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

1/92

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/53 77 13 Januaro-februaro


### PLILERTIĜI PRI LINGVOKAPABLO ESTAS "NECESAĴO"

En SES INFORMAS 5/91, s-ro R.W.Perrenoud donas kelkajn konsilojn. Inter aliaj li skribas: "Ni parolu kun ni mem".
Tiu "sinalparolado" estas vere tre grava; mi jam povis plurfoje konstati, ke homoj lernantaj tiel, rapide progresas. Sed ni vidu ekzakte, kio okazas.
Ĉu dum memlernado, ĉu dum iu kurso la lernanto legas, aŭdas novajn vortojn, novajn strukturojn, novajn konstruaĵojn prilingvajn. Se li ne digestas ilin, ili restos senutilaj kiel balasto en la memoro. La lernanto devas maĉi ilin, meme ludi kun ili, provi uzi ilin esprimante ion personan. Post tio devas okazi dua etapo: Kiam li renkontiĝos kun sia kursgvidanto, li submetos al li kelkajn tiklajn frazojn por havi kontrolon. Tio povas okazi ĉu perletere ĉu pertelefone, se ne okazas kurso. Sen tiu interŝanĝo iu lernanto povas komplete perdiĝi en nekomprenitaj strukturoj.

Mireille Grosjean
instruistino pri lingvoj

* * *

### ĜENERALA KUNVENO DE LA SVISA ESPERANTO-SOCIETO

Ĝi okazos la 14-an de marto 1992/10.00-16.00h, en konferencejo EMMENTAL, Tannwaldstr.34 en Olten (vidalvide al la stacidomo).
Laŭ peto de la hotelestro ni devas informi lin pri la nombro de partoprenontoj kaj pri la dezirata menuo.
Konante la malfacilaĵon trovi konvenan lokon, ni opinias, ke ni adaptiĝu. Tial ni petas sendi la aliĝilon (paĝo 8) al la indikita adreso, ĝis la 1-a de marto 1992. Tutkoran dankon. -FL-

La fervojista ĝenerala kunveno de SAEF okazos la 14.3.91.09.30-10.45h, samloke kiel tiu de SES.

## KOTIZO 1992, ALVOKO DE LA KASISTO

Jam pluraj membroj pagis la kotizon por la jaro 1992. Ili meritas koran dankon!

Ĉar ankaŭ la ceteraj membroj certe kaj volonte deziras kotizi por 1992, ni almetas koncernan enpagilon. Sed ankaŭ donacoj estas ĉiam bonvenaj! Nepre indiku kion vi pagas, ekz.: Kotizo 1992, donaco ktp.!

MEMBRO-KOTIZOJ (inklusivas abonon al LF kaj SI)

| | |
|---|---|
| - infanoj k. geknaboj ĝis 18 jaroj | SFr. 5.- |
| - junuloj ĝis 26 jaroj | 30.- |
| - emeritoj, pensiuloj | 30.- |
| - geezoj emeritaj | 45.- |
| - ceteraj membroj | 50.- |
| - geezoj | 75.- |
| - abonantoj sen membreco | 30.- |

Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj pere de baldaŭa pago subtenas niajn klopodojn servi al VI!

Via kasisto: E. von May

* * *

## PROPAGANDO

En la gazetoj "DIE OSTSCHWEIZ" (La orienta Svislando) kaj "DER VOLKSFREUND" (La popolamiko) aperis, en oktobro 91, grandpaĝaj intervjuoj pri Esperanto, kun bildoj de la prezidanto kaj la sekretario de la Esperantoklubo Wil, sinjoroj St. Pochanke kaj Ernst von May. Vere bona propagando. Gratulon. -FL-

ooOoo

## FAMILIA FELIĈO

La 26-an de novembro 1991 la cikonio alportis al la esperantista familio Luise kaj Aŭgusto Ochoa (membro de la grupo Bern) Waldmannstrasse 53-d3 3027 Bern, filineton NOEMI.
En la nomo de la legantaro de SES INFORMAS mi kore gratulas kaj deziras ĉion bonan. -FL-

ooOoo

* Redaktfino de SES INFORMAS n-ro 2/1992 estas la 12-a de februaro 1992.

ooOoo

## GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BERN:
En restoracio AL FORNO Spitalgasse 37.
7.1.19.30h kaj 4.2.19.30h kaj 3.3.19.30h

ESPERANTOGRUPO "LA STELO" Ĝenevo:
12.1.1992 (dimanĉo) okazos nia Zamenhoffesto.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:
En restoracio SIMPLON Habsburgerstrasse 16.
14.2.20.00h (vendredo) ĝenerala kunveno, plue ĉiam la 1-an merkredon de la monato, kun escepto de aŭgusto kaj oktobro, je 14.00h en restoracio BIG BEN Winkelriedstrasse 39

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:
23.1.20.00h monata kunveno en rest.Mägd. Finkorekto de tekstoj pri Basel.
27.2.20.00h en rest.Mägd. Ĝenerala kunveno.

ESPERANTOKLUBO WIL:
En restoracio Schweizerhof Unt.Bahnhofstr.18.
2.1.20.00h memorigo pri vojaĝo tra Norvegio kaj Svedio. Parolos B.S. Pochanke.
5.2.20.00h en la hejmo de la prez. Lettenstr.70 Karnavalaj kutimoj. Parolos S. Sennhauser.

ESPERANTO-JUNULARO ZUERICH:
Kunveno la lastan lundon de la monato en Drahtschmidli, do:
27.1.19.00h kaj 24.2.19.00h.

ESPERANTO-GESTUDANTOJ ZUERICH:
ĉe D. Weidmann Florastrasse 17 8008 Zürich.
7.1.19.00h; 14.1.19.00h; 21.1.19.00h;
28.1.19.00h; 4.2.19.00h; 11.2.19.00h;
18.2.19.00h kaj 25.2.19.00h.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:
13.1.19.00h MONATA KUNVENO en Karl der Grosse.
10.2.19.00h ĝenerala kunveno " " "

## PROTESTLETERO

Sinjoro Ambasadoro,

Kiel ni konstatas, en la proksima tempo ne ekzistas espero por paco en Jugoslavio, antaŭ ĉio en Kroatio. Svene observante la militon, ni protestas kontraŭ la brutala agmaniero de viaj ŝtato kaj armeo kontraŭ Krotatio, lando, kiu deziras vivi en libereco, kaj kontraŭ pacamaj homoj, kiuj senkulpe pereas pro la egoismo de kelkaj politikistoj kaj armeanoj.

Ni, pledantoj por la respekto de la homaj rajtoj, estas konvinkitaj, ke la militkrimoj, per kiuj sin ŝarĝas viaj ŝtato kaj armeo, ne povos esti ne punitaj.

Altestime, nome de la CK de SES
sekretario.

# TEJO-KER-SEMINARIO PRI "NEŬTRALECO - ĈU ALTERNATIVO AL IDEOLOGIOJ"? EN LA CHAUX-DE-FONDS EN SVISLANDO.

## IOM PRI IDEOLOGIOJ

Tridekon da interesitaj gejunuloj el dekkvino da landoj - ĉiuj pli malpli TEJO-proksimaj - kunigis nova seminario organizita de TEJO (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj; ĉeforganizantoj: Alessandro **Amerio**, Jan **Koszmaluk**, Andy **Künzli**, Sabira **Ståhlberg**) inter la 31a de oktobro kaj 5a de novembro 1991 en la franclingva svisa urbo La Chaux-de-Fonds por diskuti pri la temo 'Neŭtraleco - ĉu alternativo al ideologioj?'. La ĉefa sukceso de tiu ĉi seminario konsistas el la engaĝiĝo de sufiĉe interesaj prelegantoj (ekspertoj). La programo disvolviĝis kvazaŭ krampe: la unua krampo de la programo estis la enkonduka prelego de d-ro Giorgio **Silfer**, prezidanto de Kooperativo de Literatura Foiro, (Italio/Svislando), kiu komencis per esperantismo, analizante la evoluon de la neŭtraleco de la esperanto-movado de 1905 ĝis 1980. La dua krampo estis la kontribuo de Tomasz **Chmielik**, instruisto kaj tradukisto (Pollando), kiu finis per esperantismo. Inter tiuj du krampoj ni analizis ideologion kaj neŭtralecon en diversaj aspektoj, en aspektoj religia, psikologia, politika. Marilu **Münger** (Svislando), protestanta diakonino, esprimis faktojn kaj opiniojn ĉefe el la vidpunkto de protestantismo, kiu laŭ la preleganto estas pli malferma al toleremo kaj 'neŭtraleco' ol aliaj religioj. Tiu aserto reagigis kelkajn ĉeestantojn, kiuj emfazis ankaŭ kelkajn valorojn ekzemple de katolikismo. Kvankam la sekvaj prelegantoj, d-ro Tazio **Carlevaro** kaj mag. Claude **Piron**, ambaŭ psikiatroj kaj psikologoj el Svislando, tuŝis pli malpli la saman temaron, ili havigis al siaj prelegoj diversajn akcentojn: dum Tazio Carlevaro okupiĝis pri ideologioj kaj psikologio de grupoj kaj popoloj, Claude Piron reduktis ĉion ĉi al individuo, al la progreso de individuo, al tiuj psikologiaj ecoj, kiuj inklinigas individuojn vivi en ideologioj, akcepti aŭ rifuzi ilin. Tre interesa estas ankaŭ la distingo, kiun faris Piron pri tiuj grupoj aŭ homoj kun forta kaj malforta egooj.

## IOM PRI NEŬTRALECO

Sabate, la 2an de novembro, tagmeze, oni transiris al la temo neŭtraleco, komencante kun la ekzemplo de la politika, socia kaj ekonomia konceptoj de du neŭtralaj ŝtatoj eŭropaj: Svislando (prelegis Claude **Gacond**, svisa edukisto, kaj Finnlando (Osmo **Buller**, finno, direktoro de la Centra Oficejo de UEA/TEJO kaj tradukisto de la verko de U. Kekkonen, 'La finna vojo' kaj Sabira **Ståhlberg**, svedino el Finnlando). Mi opinias, ke la ĉefa diferenco inter neŭtraleco svisa kaj finna estas, ke la neŭtraleco svisa venis de sube, de malgrandaj homgrupoj kaj kantonoj, kiuj poste kuniĝis en konfederacion.

Aliflanke la finna neŭtraleco estas establita de supre, diktita de la politikaj cirkonstancoj. La finnoj ne havis alian solvon kaj devis alpreni tiun ĉi neŭtralecon, kun kiu ili fakte sufiĉe bone vivis. Estas imageble, ke baldaŭ venos la fino por ambaŭ neŭtralecoj, depende de tio, ĉu Svislando kaj Finnlando decidos ĉu aktive partopreni en la nova Eŭropo. La lasta prelegotago alportis

ankoraŭ kelkajn tre specifajn aspektojn pri la temo neŭtraleco. En prelego de Tomasz **Chmielik** estis montrita la kohereco inter diversaj ideologiaj konceptoj ligitaj kun esperanto (judismo kaj hilelismo/homaranismo de Zamenhof, Gandhi, King, Naville, Petavel, Cérésol, interpopola konduto de Privat, mondfederismo de Hodler, Lapenna, Oomoto, kvakerismo, bahaismo, k.a.). Refoje, Claude **Gacond** prezentis siajn imagojn pri neŭtraleco en la lernejinstruado kaj edukado kaj - eĉ pli interese - en interlingvistiko. Aldoniĝis ankoraŭ prezentado de la agado de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) fare de Marija **Belošević**, estraranino de ILEI el Zagrebo (Kroatio); prelegeto pri bahaismo fare de Gyöngyi **Selyem** (Hungario) kaj imagoj pri la rolo de la intelektuloj en ĉio-ĉi fare de István **Ertl** (Hungario).

Dufoje, la seminarianoj havis la okazon diskuti pri ideologioj kaj neŭtraleco en formo de laborgrupoj.

## *NEŬTRALECO NE ESTAS ALTERNATIVO AL IDEOLOGIOJ*

La seminarianoj venis al la konkludo, ke la neŭtraleco, kiom ajn bona rimedo por 'neŭtraligi' la ideologiojn ĝi eventuale povus esti, tamen ne estas alternativo al ideologioj. Fakte la iniciatintoj de la seminario ankaŭ ne celis, ke la prelegoj kaj diskutoj konduku al la inversa konkludo. Mi persone bedaŭras, ke ni ne sukcesis pli profunde veni al tio, ĉu fakte neŭtraleco inter esperantistoj ne estas iu alternativo al ecoj de aliaj ĉirkaŭantaj nin homoj. Se oni estus metinta la akcenton pli ofte sur la analizo de homaranismo kaj esperantismo, la esenco de neŭtraleco, kiel komprenis ĝin la klasikuloj de esperanto Zamenhof, Privat, Hodler kaj aliaj, estus verŝajne elkristaliĝinta pli evidente. Ĉiukaze la fenomeno de nia propra idea historia esperantista meritus pli grandan atenton de ni. Ĝuste tiu pensaro kaj idearo estas decida por ĉiuj el ni, ĉu ni restas ene de la esperanto-komunumo aŭ ne. En esperantujo mi ĉiam vidis fenomenon nekredeblan: ĉiam eliminiĝis de esperanto tiuj homoj, kiuj alvenis al ĝi nur pro lingva intereso, nur pro ludo, amuzo. Ĉiam forfalis de esperanto tiuj, kiuj komprenis ĝin kiel ludilon, nuran interkomprenigilon. Restis tiuj, kiuj serĉis en esperanto ion pli ol la lingvo, do eble tiun al ni konatan internan ideon, komunan senton. Zamenhof estis judo, kaj la judoj vivis kaj vivas en diasporeco, kiujn ligas iliaj lingvo kaj religio. Nin esperantistojn jes forte ligas la lingvo kaj apenaŭ la religio, sed nin ligas tiu komuna interna ideo, tiu malfacile priskribebla komuna interna sento. Ĝuste tio ĉi gvidas nin al iu neŭtraleco. Valorus diskutadi pli pri tiu temaro kadre de alia seminario. Ke ekzistas intereso pri tio, sendube montris ankaŭ tiu ĉi seminario.

## *VARIA DISTRA PROGRAMO*

La restado en Svislando kaj en La Chaux-de-Fonds (kiu troviĝas en la kantono Neuchâtel) donis al multaj la eblon konatiĝi kun al ili ĝis nun tute nekonataj aŭ surprizigaj aferoj. Tio koncernis la variecon kaj de la seminariejoj kaj de la manĝkutimoj kaj de la vetero kaj de la manieroj kontakti ekzemple kun la 'ekstera mondo' kaj la aŭtoritatoj. Kvankam oni tranoktis en la loka junulargastejo, la tema programo disvolviĝis precipe en la urba biblioteko, kaj pluraj vesperoj estis pasigitaj en la ejoj de Kultura Centro Esperantista (KCE) ĉe rakledo aŭ fonduo, la du tipaj svisaj fromaĝfrandaĵoj (ĉeforganizanto Mario **Lépine**). La intenco iom eskapi la kutiman esperanto-

medion. senteblis plej impone okaze de la akcepto fare de reprezentantoj de la komunumaj aŭtoritatoj de La Chaux-de-Fonds kaj de Les Brenets, kiuj ambaŭ regalis nin ne nur per afablaj salutvortoj, sed ankaŭ per aperitivo. La dimanĉa ekskurso (ĉeforganizita kaj ĉiceronita de Mireille **Grosjean-Robert**), kiun oni klopodis iom ligi al la seminaria temo mem - enhavis ankaŭ aliajn tiajn kontaktigajn erojn. Kadre de vizito de la bela horloĝmuzeo en la najbara urbo Le Locle venis prelegi sendependa loka ĵurnalisto pri la strukturoj kaj problemoj de la vasta ĵurasa regiono, kiun tranĉas pluraj kantonaj kaj departementaj limoj kaj la svisa-franca ŝtatlimo. Kiam la ĵurnalisto esprimis sian opinion pri esperanto, tiuokaze la seminarianoj vigle kaj evidente sukcese kontraŭargumentis la klasikajn antaŭjuĝojn de la ĵurnalisto pri niaj lingvo kaj movado. Ke la ĵurnalisto estis impresita pri nia kapablo interparoli en 'artefarita' (ja multe pli arte-farita) lingvo, ne mirigis la esperantistojn. Post la tagmanĝo, kiu pasis en pitoreska kelo de malnova domo en Le Locle, en kiu cetere vivis ankaŭ Hans-Christian Andersen kaj la edzino de Louis XIV, oni trajnis al la apudlima vilaĝo Les Brenets, kie atendis nin la ŝipo por turismi al brua akvofalo en la limrivero Doubs. La tagon konkludis 'vizito al la doganejo', kie la svisaj doganistoj permesis al la grupo senpasporte forlasi por momento Svislandon kaj paŝi kelkajn metrojn en Francion, simbole. Esperanto translimen! Ĉiukaze la alvenintaj ĵurnalistoj konvinkiĝis pri la uzeblo kaj utileco de esperanto kaj venonttage avidis publikigi pozitivan komenton kaj raran foton pri la grupo en la loka ĵurnalo. (rap. Tomasz **Chmielik** k.a.)

★★★★★



La partoprenantoj en la TEJO-KER-seminario
en la Chaux-de-Fonds en Svislando

DEZIRAS KORESPONDI

S-ro Dinko Pavlov, Str.Car Samuil 61
BG-8000 Burgas (Bulgario)

S-ino Stefka djulgerova, ul Tina Kirkova 7
BG-1000Sofio (Bulgario)

S-ino Dana Geržova, Uničovska 63
CS-78501 ŝternberk

S-ro Wojciech Milewski, P.O.Box 13
PL-88140 Gniewkowo


S-ro R.Pospiŝil, Glowockeho 551
CS-18100 Praha 8

S-ino Ivana Knižkova, Goĉarova 584
CS-53341 Lazne-Bohdaneĉ

S-ro Attila Szekely, Str.Tudor Vladimirescu 47
4300 Tirgu-Mures (Rumanio)

Ge-roj Ewa kaj M.Rożyccy, ul Kosciuszki 36
PL-69220 Osno (Polujo)

S-ro Jordan Velikov,
ul Haĝi dimitac 7
BG-5250 Sviŝtov (Bulgario)
Mi ege ŝatas Svislandon kaj ĝian popolon, kaj tial mi sincere deziras havi amikon aŭ amikinon el via belega lando.


J.Velikov

S-ro Monshet NHY Wa Dana,
Ciza BP 50 Lukala Rep.du Zaire

S-ro Miroslav Severa
Lukostrelecka 2188
CS-47001 ĉeska Lipa

ooOoo

MORTANONCOJ

La 18.11.91, post longedaŭra malsano, mortis MARIA GRÜNIG el Bern. Maria estis bone konata kiel fidela Esperantistino. Dum multaj jaroj ŝi estis membro de SES kaj de la grupo Bern. En UEA-kongresoj ŝi ankaŭ ne mankis kaj havis multajn esperantistajn geamikojn en la mondo. Kara Maria, ĉe la svisaj Esperantistoj vi restos en bona memoro. -FL-

Paul Enz Zürich ne plu estas inter ni. La 1.12.91 li mortis en la alta aĝo de 94 jaroj. De jardekoj li estis membro kaj ŝatata amiko kaj depost 1981 eĉ HONORA MEMBRO de la Esperanto-Societo Zürich. Ankaŭ internacie lia nomo estis bone konata. Kara amiko, en ESZ ni tenos vin en amika memoro. -FL-

ooOoo

## MONKOLEKTO POR LA RUMANA ESPERANTO-ASOCIO

Hodiaŭ ni povas informi, ke intertempe uziĝis la mono, kiu estis kolektita post la ĝenerala kunveno 1989, Fr. 160.-, favore al la Rumana Esperanto-Asocio. Antaŭ nelonge oni povis havigi al REA la sekvantajn, en Rumanio mankantajn, librojn: Plena ilustrita vortaro, Zamenhof en sia tempo, Homanarismo, Esprimo de sentoj, Historio de Esperanto, gvidlibro por supera ekzameno kaj vivo de Zamenhof.
Ankoraŭfoje dankon al la kontribuintoj. -FL-

* * *

---aliĝilo---ne forgesu la daton--------------

**Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo, 14a de marto 1992 en Konferencejo Emmental, Tannwaldstrasse 34, 4600 Olten**

**ALIĜILO**

Jes, mi partoprenos la Ĝeneralan Kunvenon en 1992.

Nomo:

Loko kaj dato:

Subskribo:

MENUOJ

Mi mendas:
- o Menuon 1: Pastetli/Vol-au-vent, karotoj kaj pizoj, frititaj terpomoj. SFR 15.-
- o Menuon 2: Rizo Kazimira, hakita kokidaĵo, Curry-saŭco kun fruktoj, salato. SFR 17.-
- o Menuon 3: Porka 'Ŝniclo' kun kremsaŭco ŝampinjonfunga, buternudeloj, legomoj, salato. SFR 22.-
- o Menuon por vegetaranoj.
- o Supon: Buljono kun ovstrioj. SFR 4.-

**Bv. sendi la aliĝilon kun la indiko pri la menuo ĝis la 1-a de marto 1992 al: SES, A. Künzli, Zumhofstrasse 22, 6010 Kriens. Por informoj: Tel. 041 45 55 83.**